

Interlingvistiko en la instru-sciencoj, temo de la internacia konferenco organizita de la Instituto de Pedagogio kaj Kibernetiko en Paderborn (24-28.11.1976),

2-a parto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 689, 1976.12.22 & 24 & 25

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni jam atentigis vin pri la graveco de la Internacia Konferenco pri Interlingvistiko en Scienco kaj Klerigo, kiu disvolviĝis en Instituto pri Kibernetika Pedagogio en Paderborn la lastan semajnon de novembro. D-ro István Szerdahelyi el Budapeŝto en sia enkonduka prelego asertis, ke tiu ĉi konferenco tutcerte markas mejloŝtonon en la historio de interlingvistiko. Ĝis nun neniam okazis tiom programriĉa kaj prelegplena simpozio pri interlingvistiko aŭ planlingvistiko.

A.- Ĉeestis la malfermo de la konferenco la landa instrudirektoro. Li esprimis sian intereson por la eksperimenta instruado de esperanto laŭ la paderborna modelo. Koncerne la instruadon de fremdaj lingvoj al la infanoj doktoro Helmar Frank estis tre kritikema. Li asertis, ke temas pri organizita stultigo de la gelernantoj, al kiuj oni perdigas milojn da lernhoroj favore al instrufako, kiun ili ne kapablas asimili.

Cl.- D-ro István Szerdahelyi provis difini, kio estas la studkampo de interlingvistiko. Ni ne estas konvinkitaj, ke li vere sukcesis tion ĉi fari, ĉar ju pli oni uzas la vorton interlingvistiko, des pli oni dubas pri la signifo de tiu ĉi termino. Por Szerdahelyi interlingvistiko estas sinonima al lingvomodeligo sur internacia lingvokampo. aŭ io simila. Estas fako ligita al lingvistiko, kvankam la lingvistoj ĝin neglektis ĝis nun. En la verkoj de la greko Aristotelo ĝerme troviĝas la ideo, ke homoj povas interveni en la lingvonormigo. Sed la vera patro de interlingvistiko aŭ planlingvistiko estas Leibniz. Liaj verkoj sintezas ĉion ĝis tiam skribita kaj lia esplorado ampleksas diversajn kaj inter si malsamajn serĉkampojn. La franca filozofo Louis Couturat komencis la publikigon de la interlingvistikaj eseoj de Leibniz, sed ĝis hodiaŭ multo restis nepublikigita kaj analizota. István Szerdahelyi esperas, ke la lingvistoj ĉesos ignoradi la verkojn de Leibniz kaj tra ili evoluigos lingvistikon al pli objektiva sinteno rilate al planlingvismo kaj planita lingvo kiel esperanto.

A.- Dum Leibniz interesiĝis pri la lingvokomparado, la moderna lingvistiko ĉefe interesiĝas pri la historia priskribo de la lingvoj. Estis ĝenerale akceptita, ke interesiĝo pri lingvoplanado, lingvoreformado aŭ eĉ nura lingvo-instruado estas malinda de lingvisto. Oni subjektive distingas lingvojn naturajn kaj lingvojn fabrikatajn aŭ artefaritajn, rifuzante al tiuj ĉi lastaj ekzistorajton. Sed postaj generacioj fariĝis pli realismaj kaj objektivaj. Lingvistoj aŭ filologoj kiel Bréal, Meillet, Baudoin de Courtenay kaj Ferdinand de Saussure ĉesis interesiĝi pri la diakronaj lingvofenomenoj (historiaj fenomenoj) favore al la sinkronaj studoj (komparaj studoj). La kurso de Ferdinand de Saussure estis tre favora al la lingvoplanado, bedaŭrinde kiam ĝi aperis presite post la morto de la fama ĝeneva lingvisto, ĉiuj aludoj favoraj al la lingvoplanado estis forigitaj kaj eĉ estis aldonitaj vidpunktoj rekte kontraŭaj al interlingvistiko. La rezulto estis malfavora al esperanto kaj planlingvistiko. Sed nun la publikigo de la manuskriptoj de Ferdinand de Saussure alportas la necesajn reĝustigojn.

Cl.- En la lingvistika literaturo la vorto interlingvistiko aperas por la unua fojo en la publikaĵoj de la 6-a kongreso de lingvistoj, ĉirkaŭ 1925. Tiam la svisa lingvisto Debrunner provis difini la laborkampon de tiu ĉi fako.

A.- Lingvistoj kiel la usonano Sepir kaj la francdevena polo Baudoin de Courtenay komencis studi la manifestiĝojn de la lingvofunkciado, la problemojn de la dulingvismo. Naskiĝis la fako socilingvistiko. Nuntempe oni kreas ne nur alfabetojn, sed planadas regionajn normlingvojn, ni pensu al Sovetio, kie dekoj da regionaj lingvoj estis kreitaj dum la pasintaj jardekoj, al Afriko, kie tiu ĉi laboro nuntempe efektiviĝas. Sed socilingvistiko povas efike interveni favore al la lingvoplanado nur interne de ŝtato, kie registaraj dekretoj povas esti police truditaj al la loĝantaro.

Cl.- Ekster la limigita kadro de la ŝtataj landlimoj socilingvistiko fariĝas senpova. Tiam laŭ doktoro István Szerdahelyi interlingvistiko ekludas rolon. Ĝia esplorkampo estas la lingvo-kontaktoj kaj solvendaj lingvo-problemoj en la internaciaj rilatoj. Esperanto pli kaj pli estas konsiderata kiel taŭga solvo kaj kiel esplorobjekto. Kelkaj pro tio rezignas pri la vorto interlingvistiko profite al la pli klara esperantologio, kiam temas pri priskribo de la funkciado kaj disvolviĝo de la zamenhofa lingvo.

A.- En alia prelego István Szerdahelyi, sub la titolo *lingvomodeligo – lingvopolitiko* alportis multajn sciigojn pri la hodiaŭa disvolviĝo de la interlingvistikaj esploroj kaj pri ties rezultoj aŭ eblecoj. Li montris, ke la moderna societo kaŭzas akriĝantajn lingvajn problemojn, kies financaj konsekvencoj estas pli kaj pli konstatablaj. Tiuj problemoj neniam estas pure lingvaj, ili estas ligitaj al aliaj studfakoj : psikologio, sociologio, pro tio interlingvistikaj problemoj interesiĝas pli kaj pli al najbaraj sciencoj. Nuntempe matematikistoj okupiĝas pri aŭtomata tradukado, sociologoj pri dulingvismaj problemoj, pri la defendo de minoritatoj. La socilingvisto Tauli provis difini la ĉefajn ecojn de internacia lingvo.

Cl.- Ni atentigas vin, ke la verko Metodologio de Esperanto de István Szerdahelyi alportas multajn interesaj sciigojn pri la temo, kiun ni hodiaŭ tre resume pritraktis laŭ notoj prenitaj en la internacia konferenco okazinta en Paderborn.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!